Universala Esperanto-Asocio

TRILANDA KONGRESO

Estrara Subteamo: MOVADO

EKO 2016-09 sendita el Bandung la 25an de marto.

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, la E-gazetaro kaj radiostacioj, listoj kaj unuopuloj (petu senpagan ricevon!).

## Azio kaj Oceanio – ligitaj per brava iniciato

La Muzeo en Bandung pri Azia-Afrika Kunlaboro disponigis la lokon por la malferma ceremonio de la Trilanda Kongreso de Esperanto okazanta nun en Indonezio. Partoprenis la solenaĵo la direktoro de la muzeo, s-ro Thomas A. Siregar, kiu salutis i.a. per kelkaj frazoj en Esperanto. Ĉeestis plie profesoroj de la universitato ligita kun la muzeo. En tiu muzeo kaj la universitato funkcias E-klubo kaj E-kursoj, tiel, ke kreiĝas regule novaj junaj esperantistoj kaj lernantoj.

Post aŭdigo de la nacia himno de Indonezio, bonvenigaj vortoj venis de la Loka Kongresa Komitato. Sekvis salutoj de la prezidantoj de la tri partoprenantaj landaj asocioj de UEA: Indonezia (IEA), Aŭstralia (AEA) kaj Nov-Zelanda (NZEA). De UEA legeblis en la Kongresa Libro skriba saluto de ĝia prezidanto, Mark Fettes, ankaŭ de estrarano Lee Jungkee. Surloke povis saluti sentekste la vic-prezidanto de la Asocio, kies postkreita teksto legeblas aparte.  Post la salutoj de la reprezentanto de la muzeo kaj la universitato la partoprenantoj kune kantis la Esperantan himnon. Fermis la solenaĵon impresaj kulturaj eroj: kvar-persona danctrupo, sekvata de kantistino kun dek-persona orkestro, kiu muzikis per tradiciaj indoneziaj instrumentoj (bambuaj ksilofonoj, tamburoj kaj angklungo).

La muzeo famiĝis ĉar ĝi gastigis en 1955 gravan konferencon de nealiancitaj ŝtatoj – pluraj el kiuj en tiu tempo estis fermantaj siajn koloniismajn epokojn, kaj kiam regis pro la establiĝo de la Malvarma Milito granda timo pri la minaco de nuklea milito precipe al nealiancitaj landoj. La originala konferenca halo kaj ĝiaj mebloj estas bone konservataj kaj la kongresanoj povis viziti ĝin; tie okazis la komuna fotado (vidu sube)



foto: Kam Lee

La kongreson partoprenas 101 kongresanoj el Aŭstralio, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Indonezio, Koreio, Nov-Zelando, Singapuro kaj Orienta Timoro.

Stefan MacGill kaj Ilia Dewi.

Pli detalaj kongresaj raportoj sekvos de la trilanda organiza teamo.

### Saluto de la vic-prezidanto de UEA, Stefan MacGill al la Trilanda Kongreso

Mi ĝojas saluti nome de Universala Esperanto-Asocio la Trilandan Kongreson de Esperanto. UEA estas monda organizo, kiu kunigas esperantistojn el 102 landoj; en 72 landoj ekzistas aliĝintaj landaj asocioj. Tra lastaj jaroj tre aktivis kaj kreskis kelkaj aziaj asocioj, kaj fondiĝis novaj. Ĝuste la plej juna, plej nova, plej freŝa estas la indonezia, akceptita antaŭ nur ok monatoj. Tial estas tre ĝojige povi partopreni la nunan kongreson. *(Je tiu punkto UEA transdonis al IEA pakon da revuoj).*

Anoj de UEA okupiĝas multe pri universitata agado diverslande; ĝojige estas kompreni, ke ankaŭ ĉi tie tio bone funkcias. Plie, UEA laboros por praktike uzi la lingvon por malfermi kontaktojn por la Muzeo inter aziaj kaj afrikaj E-asocioj kaj E-grupoj. *(Je tiu punkto estis prezentita Lee Jungkee, kiu en la estraro de UEA respondecas kaj pri Azio kaj Afriko).*


Multo okazas nun en UEA. Ni estas ĝuste nun aĉetantaj duan domon en Roterdamo, kie povos loĝi volontuloj, inter kies taskoj estos progresigi la movadan evoluigon por ke pli da homoj aŭdu pri la lingvo kaj eklernu ĝin. La Asocio okazigas kongresojn: la sekva en Slovakio, poste en Seulo. Formiĝas planoj, ke okazu ene de la sekvaj kvino da jaroj la unua Universala Kongreso en Afriko.

En la nuna kongreso okazos la 21a trejnseminario por la maturigo de aktivuloj. Mirinde, la unua tia AMO-seminario okazis antaŭ nur du jaroj. Dum la kongreso estos ebloj starigi demandojn pri UEA kaj vidi bildan resumon pri tiuj du jaroj da AMO.

La modelo de plurlandaj kongresoj estas imitinda – precipe se tiuj kunvenigas homojn de diversaj kulturoj kaj fonaj lingvoj. Tial UEA deziras al la nuna kongreso plenan sukceson!

## Singapuro – ankoraŭ unu verda punkteto en la azia firmamento

Kelkaj lokaj esperantistoj en Singapuro ariĝis por renkontiĝi kun la vicprezidanrto de UEA, kiu pasigis tri tagojn en la urbego-ŝtato. Temis pri neformala babilado, kiu ebligis al UEA havi pli klaran ideon pri la stato de la E-komunumo tie kaj la perspektivoj por kresko.



La kunvenintoj ĉiuj havas respondecajn postenojn, do la disponebla tempo por E-agado estas limigita. Tamen, UEA faros proponojn, kiel fari informkampanjon, ekzemple en universitataj rondoj, kiu disponigos utilajn retajn kontaktojn, aŭ povos esti sekvata de intensa konatiga kurso.

Singapuro estas etne kaj kulture nekredeble diversa, do superflue la esperantistoj prezentu interkulturon – tie oni vivas kaj praktikas ĝin ĉiutage.

Vortoj: 388